

Verschiĝnt maandelijks
Zestiende jaargang
Nummer 6 (180)
JUNI 1949

Vertegenwoordiger in Nederland:
LEEN
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P.M. Mabeoone
Pythagorasstr. 122 Amsterdam O.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTEN-BOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN:
* Leden: 75 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden: 25 fr.
(* met hondsorgaan)


ABONNEMENTEN:
België: 60 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

Kongres-impresoj L.E.E.N.

Nia speciala raportisto sabaton frumatene alvenis en Haarlem kaj tuj direktis siajn paŝojn al « De Leeuwerik », kie akceptis lin la « kongrespatro » E. de Wolf, kies glimbrila kapo reflektis la radiojn de la suno, kiu laŭmende benis nin dum la tuta kongreso. En la akceptejo li renkontas s-ron Teunissen, kiu kion ajn lerte li kvarpiedule manovras inter libropakaĵoj, ne sukcesas eviti kolizion kun alrapidanta ŝtupetaro, sub kiu videbligas la kruoj de s-ro Vergunst. S-ro Henskes faklerte aranĝas la librotablojn, antaŭkalkulante la enspezotan gajnon. En la granda salono oni ŝvitas, kuras tien kaj reen, ĉarpentas, pendigas flagojn, agordas pianon, aranĝas la scenejon. Jen alvenas la dekorantoj, precize gustatempe, ĉar kvankam oni decidis malfermi la kongreson nur je la 13.30 h., jam antaŭ tagmezo aperas la unuaj kongresanoj, kiuj tuj estas dungataj kiel libervolaj helpantoj. La akceptejo kaj la salono iom post iom plenigas. Jen la haganoj; momenton poste alvenas la ĉefurboj kaj jam alproksimiĝas la grava momento de la solena malfermo. Malantaŭ la ankoraŭ fermitaj kurtenoj s-ro Baas elbushigas siajn lastajn ordonojn; la pianistino nerve palpas la klavojn; flanke de ŝi jam videblas la nudaj kruoj de indiĝenaj belulinoj, kiuj portas la naciajn flagojn; lasta komando kaj jen la kurteno levigas kaj antaŭ 500 mirfrapitaj okuloj de 250 kongresanoj malvolvigas la grandioza spektaklo de la solena malfermo. Starante oni kantas la naciajn himnojn; malfermparoladas s-ro Baas, la prezidanto de L.E.E.N. Salutas la kongreson kiel reprezentanto de la komunumestro la skabeno pri instruado s-ro D.J.A. Geluk; sekvas s-ro d-ro Th. v. Gindertaelen (nia kunlaboranto de F.L.L.E.), s-ino M. Haudebine (Francujo), angla kongresano, S.K. (Nielsen), kaj reprezentantoj de la ĉefestraro de F.L.L.E., de la loka F.L.L.E.-sekcio, de Bellamy kaj « Vredesraad ». La sekretario voĉlegas salutojn de N.K., K.U.N.E., Sveda Esperanto-Federacio, Belga Esperanto-Ligo, Germana Esperanto-Asocio, T.J.O., F.E.R.N., s-roj E. Malmgren kaj P. Heiker. Post la oficiala malfermo la kongresanoj promenis al la Granda Preĝejo por mulvarmumi pro la granda temperaturdiferenco kaj aŭskulti la orgenkonzerton de s-ro Michels, kiu plenigis ĉies animojn per dolca muziko. Por ke ankaŭ la stomakoj plenuĝu, la kongresanoj diversloke kolektiĝis. La heriĉaj samideanoj rapidis al Heck, kie ankaŭ nia raportisto trovis lokon kaj kie regis kvietata atmosfero ĝis laŭta bruono anoncis la invadon de haga procesio sub komando de s-ro Burger. Vespere f-ino A. Schoen kaj s-ino M. de Witte konkeris la korojn de la muzikamantoj per ravaj sonoj kaj la aliaj kongresanoj inkluzive de s-ro v. Gindertaelen perdis siajn korojn, vidante la de paĉjo de Wolf zorge elektitajn belulinojn, kiuj elegante gimnastikadis. En la paŭzoj oni apenaŭ trovis la tempon por plenumi siajn laŭprogramajn interkonatiĝajn devojn...

Dimanĉmatene multaj L.E.E.N.-anoj ĉeestis en la Nova Preĝejo la diservon, en kiu predikis pastro H. F. Bruins el Leeuwarden. Pri la jarkunveno ni raportas aparte. Post la komuna lundo s-ro d-ro W. J. A. Manders faris interesan prelegon pri la temo: La aliaj kaj ni. La menuo de la komuna festmango ne troigis; vere ni manĝis bonguste kaj remaĉante eĉ trovis la tempon aŭdigi kelkajn kantojn. Vespere sekvis denove muzika programo kaj post la paŭzo sekcio Haarlem montris al vi vivajn bildojn el sia 40-jara ekzistado. Pro troa amplekso de la fotoalbumo apenaŭ restis tempo por la balo. London matene ni invadis la aŭtobusojn, kiuj veturigis nin al la marbordo. Ha, jen la surbordiginta sveda ŝipo « Banck », sed la buso ne haltas kaj momenton poste ni jam veturas preter la florkampoj. La enhavo de nia buso, parte flandra do bonhumora, mirigas la multajn promenantojn kaj biciklantojn, blekante kantojn en por ili nekomprenbla lingvo. Jam ni haltas pro ĝenerala sensoiĝo. Pro manko de seĝoj ni sternas niajn korpojn sur la sunvarmigita sablo kaj manĝas, trinkas, babilas. Kun

XIV-a KONGRESO DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA Gent, 4-5-6 de junio, 1949



Gent - Grafa Kastelo
(vizitota Lunde)

La Kongreskomitato havas la honoron seligi ke la Genta Urbestro, Sro E. CLAEYS, volonte akceptis la honoran Prezidantecon de nia Kongreso kaj ke li skribe deziris al ni fruktodonan laboron kaj plenan sukceson!

Aidonoj al la Kongresa Programo

Subate, 4-6-49

16.30 h. Akcepto de la lokaj ĵurnalistoj kaj delegitoj de la turisma servoj.
19.00 h. Kunveno de la ĝeinstruistoj kaj simpatiantoj.
20.00 h. Malfermo de la Kongreso: Salutoj de la Eksterlandanoj kaj sekciaj delegitoj -Balo (ĝis la 2-a);

Dimanĉe, 5-6-49.

9.45 h. Vizito al « Geraard de Duivelsteen ».
13.30 h. Komuna tagmango.
15.30 h. Komuna foriro por grupaj vizitoj al « 's Gravensteen » aŭ « St. Baafsabdij ».
20.00 h. En la Kongresa Varietea Vespere kunlaboros, koncerne la muzikan parton, F-ino R. DEBRABANDERE, ĉampionino de Eŭropo (akordlono; kategorio 14 jaroj).
La O.K. deziras al ĉiuj gekongresanoj plej bonan alvenon, gajajn tagojn, fruktodonajn kunsidojn kaj mem mendis belan veteron!
Ĉiuj kunportu gajan mienon!

Jarkunsido F.L.L.E.: 1. Malfermo; 2. Financa Raporto; 3. Ĝenerala Raporto; 4. Varbkonkurso; 5. Rezolucio 6. Propono Oostende; 7. Rezolucio; 8. Fermo. Propono Oostende: Sekcio Oostende proponas kombini la ligan kaj sekclan kotizojn kaj ebligi partan enspezon fare de la sekcioj.

Kelkaj rezultatoj de la Varbokonkurso: Por sekcioj = 1. Mechelen (312 poentoj); 2. Brugge (170 poentoj); 3. Gent (25 poentoj). La reprezentantoj en Rumbekke, Sro Van Leuven, varbis 135 amikojn, kaj gajnis entute 170 poentojn... kaj la individuon unuan premion! Gratulojn!

Sekcio Oostende akceptis organizi la 15-an en la reĝino de la banurboj!

KONGRESANOJ — DUA LISTO

37. S-ino I. De Boes, Buttenaere, Gent; 38. F-ino M. J. Toos, Veurne; 39. F-ino A. Bombeke, Ledeburg; 40. S-ro A. Marmenout, Blankenberge; 41. S-ro P. Samijn, Roeselare; 42. F-ino H. Holkens, Antwerpen; 43. S-ro L. Vandepitte, Gent; 44. S-ro A. Decorte, Gent; 45. F-ino A. GERBRANDA, DORDRECHT (Nederland); 46. S-ro P. M. MABESOOONE, AMSTERDAM (Ned.); 47. S-ro H. MABESOOONE, AMSTERDAM (Ned.); 48. S-ro C. B. ZONDERVAN, DEVENTER (Ned.); 49. S-ino E. H. ZONDERVAN, DEVENTER (Ned.); 50. F-ino P. De Cock, Aalst; 51. S-ro Fr. Roosen, Aalst; 52. S-ino Cl. Roosen, Aalst; 53. F-ino G. Van den Bossche, Aalst; 54. F-ino E. Lemaitre, Aalst; 55. F-ino J. Mallet, St. Kruis (Brugge); 56. S-ro F. Roose, Brugge; 57. S-ino H. Roose-De Kersgieter, Brugge; 58. F-ino M. L. Roose, Brugge; 59. F-ino M. T. Roose, Brugge; 60. F-ino E. Hensen, St. Kruis (Brugge); 61. F-ino I. Hensen, St. Kruis (Brugge); 62. F-ino H. Seye, Brugge; 63. S-ro J. Demille, Brugge; 64. S-ino M. L. Demille-Bruyneel, Brugge; 65. S-ro E. Paesmans, Antwerpen; 66. S-ro Pasto De Mayer, Wijmaal; 67. F-ino A. Bernaerts, Lier; 68. F-ino R. Van Loock, Lier; 69. F-ino H. Van der Auwera, Heist-op-den-Berg; 70. F-ino H. Messmaeckers, Heist-op-den-Berg; 71. F-ino L. De Potter, Laken (Brussel); 72. F-ino S. Henot, Etterbeek; 73. F-ino T. M. DE QUAASTENIET, WINKEL (Ned.); 74. S-ino I. Buyl-Podevijn, Aalst; 75. F-ino A. D' Hainaut, Gent; 76. S-ro A. Foubert, St. Nikolaas; 77. S-ro J. Cautaeert, Ronse; 78. S-ino J. Cautaeert, Ronse; 79. F-ino C. Dirckx, MONTEVIDEO, URUGVAJO; 80. F-ino M. Buis, Mechelen; 81. F-ino M. Th. Roels, Brugge; 82. S-ro R. Martens, Brugge; 83. S-ro J. Gielen, Brugge; 84. F-ino S. Moulabrouck, St. Kruis (Brugge); 85. D-ro M. Roels, Brugge; 86. F-ino H. Hofman, Brugge; 87. S-ro A. Demarey, Brugge; 88. S-ro F. Volders, Antwerpen; 89. S-ino M. Volders-Van der Mast, Antwerpen; 90. S-ro St. Dhaenens, Oostende.

« Fernando » el Brugge, kiu enkadrigita inter du hilversumaninoj kuŝas flanke de ni, ni parolas pri la junularproblemo. Li estas la plej longa el la flandroj; la aliaj apenaŭ videblas kaj kiom junaj ili estas! Mi iom envidas la flandrojn; la junaj funkciuloj de F.L.L.E. ja ŝkre kontrastiĝas kun la plejparte jam kalvaj dignoplenaj L.E.E.N.-gravuloj. Sed la veturemaj aŭtobusoj ne lasas al mi tempon por meditado; post enbushigo de la de la zorge preparitaj lunĉpaketoj, enbushigo de la kongresanoj kaj ek al hotelo Brinkman, la fincelo de nia ekskurso, kie s-ro Baas fermas la kongreson. Ĉu vere jam finiĝis la kongreso? Jes, senrevene! Ĉu ĝi sukcesis? Laŭ mi jes. Kompreneble estis mankoj kaj kritikindaĵoj. La gastigado ne estis tute en ordo; parte kulpis pri tio la kongresanoj mem, parte kelkaj gastigantoj, kiuj lastmomente preferis eksterlandan gaston kaj sendis la nederlandajn samideanojn al multekosta hotelo. Kaj kion diri pri la fakto ke s-ro Wolters hejmenvenante trovis inseksan estajon en

sia lito? Felice li tute ne ŝokiĝis sed kun sia konata flegmo promenis al la polico, kie li dormas senpekulan dormon... Mankis en la kuponaro enribiletoj por ambaŭ vesperoj, mankis al la danoj la deziro miksi sin inter la kongresanoj kaj habili iom Esperante; pro la multaj cetere altnivelaj muzikaj programejoj la prezentado fariĝis iom unuflanka; la tro longa historia resumo postpaŭza ne povis forĝeŝigi al ni la kutimajn kongresrevuojn kaj ni iom povas kompreni la senluziigon de la flandroj, kies kongreŝoj konsistas el balo kun ekskursoj (en la paŭzo oni jarkunvenas) ... sed malglataĵoj ja ĉiam estas, ĉar la kongreskomitato kiu energie laboris kaj al kiu ni ŝuldas koran dankon pro ĉio, konsistis el homoj kaj ne el maŝinoj. Nu, baldaŭ ni, kontentuloj kaj nekontentuloj, ja denove renkontiĝos en Groningen. Ĉu baldaŭ? Jes ja! La tempo rapide pasas nuntempe. Ankaŭ vin, kiuj ne ĉeestis ĉi tiun kongreson oni kore bonvenigos en la nordnederlanda metropolo, do ĝis la revido en Groningen!

DANGERA PROPAGANDO

De tempo al tempo aperas en la Esperanto-gazetaro komunikoj, kiuj devas atesti pri la facileco de nia lingvo. Ni legas pri personoj, kiuj lernis Esperanton en kelkaj semajnoj. Kompreneble temas pri esceptoj, sed niaj tro fervoraj propagandistoj ofte forgesas tion. Ili fanfaronas pri la facileco de Esperanto kaj distrumpetadas, ke ekzemple Tolstoj jam parolis la lingvon post unutaga studo. Per lerta reklamo kelkaj kursvidantoj logas siajn viktimojn, promesante al ili fluan parolkapablon post nur 10-12 lecionoj. Venu al mi kaj post unu monato vi korespondos kun esperantistoj el 100 landoj!! Eble ili logas per tia trompa propagando kelkajn kursojn, sed la sukceso de tiaj kursoj estas negativa; jam dum la kurso la kursanoj, kiuj venis por ludante lerni Esperanton, senluziigitaj forrestas kaj neniam revenos en niajn vicojn. Por la movado ili estas perditaj kaj anstataŭ fervoraj adeptoj ili fariĝos kritikantoj, kiuj povos malutili al nia movado. Tiuj, kiuj vidas sin trompitaĵoj en siaj esperoj sed tamen persistas ĝis la amara kursfino, balbutos kaj plifortigos nian armeon de eternaj komencantoj. Se ni deziras, ke la « ekstera mondo » rigardu Esperanton serioza afero, ne amuzajo sed lingvo, egalvalora al ĉiuj aliaj lingvoj, ni antaŭ ĉio mem donu la bonan ekzemplon kaj ne ridindigu nian aferon per falsa propagando. Ni reklamu laŭvere, ne fanfaronante. Tiam ni altiros la verajn interesatojn, kiuj post la kursoj entuziasmiĝinte fariĝos eternaj batalantoj anstataŭ kritikantoj aŭ eternaj komencantoj.

FIDU AL LA RECENZISTO

Kiu bone volas lerni nian lingvon Esperanton, radikale do ekstermi ĉiun parazitajn planton, fidu al la recenzist' kaj kontraŭu al rezist' de la mensa araganto, kiu kredas Esperanton, kion antaŭuloj fiskribadis laŭ reguloj, fuŝkovitaj el la ov' de Doktoro Zamenhof.

Recenzisto kaj logiko samas en la lastaj jaroj, sed se regas vin skeptiko pri la prezentitaj varoj, nur « daŭrigu » per la vort' (ne « parolu plu ») pri l'fort' de la lingvo ĉiam kreska, pri la limo ŝajnburleska, kiu recenzistoj strekas al verkistoj, kiuj pekas kontraŭ la beata leĝ' de la kritikanta reĝ.

Sed se male vi konsente, kiel mi mem, gojakeptas la regulojn tre prudente, kiujn recenzist' konceptas per cerbfirma kapsoŝid', vi honori lin per fid' kaj nur faru preman peton, ke dolidu la dekreton sencoplana konsidero pri la verko sur papero, donacita de l'aŭtor', kvazaŭ priflarota flor'.

TYNEVERUM.

RECTIFICATIE

In het artikel « Invoering van het E. bij het V.H. en M.O. in Nederland » slopen volgende fouten: al. 2 lijn 5: commissie = compromis; al. 6 lijn 5: na de zin ... boven sprak? dient ingelast: Aan wie de keuze?

